



# La Riverego

Printempo de 1998

Esperanto-Societo Kebekia

N<sup>o</sup>50<sup>a</sup>, Jaro 13<sup>a</sup>

## Teatraĵo pri Esperanta libro

Paul Ronald

Le Centre Saidye-Bronfman a présenté une pièce de théâtre dans laquelle un dictionnaire espéranto-yiddish, d'ailleurs rédigé par un Montréalais, joue un rôle central.

**D**um du sinsekvaj vesperoj la juda publika biblioteko prezentis teatraĵon *Fineman's Dicktonary*, verkita de Sam Gesser, nevo de Harry Fineman, kiu kreis la vortaron « Jida-esperanta - Esperanta-jida ».

Fineman loĝis en Montrealo en la 60<sup>aj</sup> jaroj, do kelkaj inter ni konis lin. Li laboris 30 jarojn por kunmeti la vortaron, kiu eldoniĝis en 1966.

Samuel Gesser naskiĝis en Montrealo kaj famiĝis ĉefe kiel presisto. En 1993 li ricevis la Ordenon de Kanado pro tio kiel ankaŭ pro verkado por radio kaj televido.

Reĝisoro estis Muriel Gold, antaue arta direktoro en la Centro Saidye Bronfman.

Sep personoj geaktoroj prezentis la teatraĵon: unu ludis fantomon. Ĝi estis en la angla kun kelkaj Esperantaj vortoj, speciale *tempoperdo* kiun ripetis la fantomo kelkfoje por minaci, ke la vivo estas mallonga.

Temas pri juda familio, en kiu la infanoj emas kvereli inter si kaj kun la gepatroj. La filo estas tre orodoksa, kaj nur li do konas la veron. La filino volas translokiĝi al Toronto kun la amato, kiu deziras edziĝi kaj iĝi juda. La patro de

tempo al tempo trovas en la vortaro vortojn kiuj helpas pacigi la batalon. Tamen je la fino ĉiuj parolas samtempe.

En la enirejo estis vitroŝranko kun Esperantlingvaj dokumentoj: la vortaro de Fineman, membrolisto de

KEA 1965 kun lia nomo subskribita, invito al klubkunveno en restoracio subskribita de Frank de Kinder, iama prezidanto de MEK, kaj aliaj.

Kostis 10 dolarojn kaj mia filino kaj mi konsideris tion kiel bonan elspezon.

## Le congrès nord-américain d'espéranto s'en vient

En juillet de cette année, une centaine d'espérantistes de toute l'Amérique du Nord se réuniront à Montréal pendant trois jours. Si vous êtes un débutant, voici une bonne occasion de progresser. Les plus avancés sont pour leur part invités à préparer quelque chose. Nous avons aussi besoin d'aide pendant le congrès.

## La Nord-Amerika Kongreso de Esperanto alvenas

Julie 98, kongresos en Montrealo, centoj da esperantistoj el tuta Nord-Ameriko. Se vi estas komencanto, jen ebleco por vi, progresi en la lingvo, praktikante kun multaj personoj dum tri tagoj. Se vi estas lertulo, jen ebleco por vi, prezenti ion. Pripensu temon, preparu vin kaj ĉefe, tuj anoncu vin al Normand Fleury (514 / 495-8442 aŭ 272-0151) aŭ <esperanto@sympatico.ca>. Vi povas ankaŭ helpi planante vizitojn, ĉe la kongresejo, kaj tiel plu. Vidu la koloran informilon/aliĝilon por pliajn informojn pri datoj kaj loko.

## Le défi des langues

Normand Fleury

Verkita de fama svisa lingvisto Claude Piron, la libro rapide elĉerpiĝis en Eŭropo. Restas ses ekzempleroj en la Libroservo de Montrealo. Rapide mendu je favora prezo de 40 \$ (inkluzive de sendokostoj). Pli bone estas inviti vian lokan bibliotekon mendi ĝin. La libro komparas diversajn eblecojn solvi la lingva kaoso en la mondo. Temas pri vere bona libro, ne tro faka.

Ce livre du linguiste et psychologue suisse Claude Piron est déjà épuisé en Europe. Il nous en reste six exemplaires. On peut se les procurer au coût de 40 \$, frais de port compris.

## Déménagement virtuel

Suite au départ pour Taïwan de Marco Maertens, la S.Q.E. a dû trouver un nouveau responsable pour ses pages web. Alexandre Voscorian, un nouveau membre, s'est heureusement offert. Nous avons donc une nouvelle adresse de courrier électronique : <esperanto@sympatico.ca>, et une nouvelle adresse pour nos pages web : <www3.sympatico.ca/esperanto>.

## Montrealaj Esperanto-kunvenoj

Atentu la novajn datojn. Legu en la Kalendaro de venontaj okazaĵoj, en la lasta paĝo.

Nouvelles dates pour les rencontres montréalaises. Reportez-vous au Kalendaro de venontaj okazaĵoj, à la dernière page.

## Retaj paĝoj de ESK

Normand Fleury

Marco Maertens, kiu lerte okupiĝis pri la retaj paĝoj de ESK forvojaĝis al Tajvano. Bonŝance, Alexandre Voscorian, nova membro de ESK, tuj sin proponis por ĝisdatigi la informojn. Ni devis trovi novan retserviston kiu ne kostus tro kaj fine la nova adreso estas : <www3.sympatico.ca/esperanto> Vizitu niajn retpaĝojn kaj informu viajn konatulojn pri la eblecoj lerni esperanton rete !

La retadreso estas <esperanto@sympatico.ca>.

plus d'un, un document audio inédit et unique.

Merci beaucoup aux participants, aux acteurs et surtout à Yvon, pour cette soirée mémorable.

## Une idée d'Yvon !

Normand Fleury,  
alias Zamenhof

C'est Yvon Roux qui a eu l'idée, pour le 110<sup>e</sup> anniversaire de l'espéranto en décembre dernier, de coordonner une soirée « théâtre-historique ». Des rôles furent distribués à plus de 10 personnes. La trentaine de participants à la « Zamenhofa Festo » ont donc assisté à une soirée où se côtoyaient de grands personnages : L.L. Zamenhof, A. Grabowski, Lidja kaj Klara Zamenhof, Kabe, le marquis de Beaufront, etc. Personnages qui ont joué un grand rôle au début de l'espéranto, vers la fin des années 1880.

Zamenhof accueillait les gens à leur arrivée et les différents personnages appurent tout au long du repas communautaire. Le repas avait aussi un caractère particulier puisque des mets juifs, polonais et russes ont été servis. Merci à Zdravka qui a beaucoup cuisiné pour l'occasion. L'ambiance fut très animée et comme toujours, des plus amicales. Un extrait de la voix de Zamenhof, enregistré lors du passage de ce dernier à Montréal, après le congrès mondial d'espéranto à Washington en 1910, fit découvrir à

*La Riverogo (Le fleuve)* est publié par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 110 exemplaires. Gratuit pour les membres de la S.Q.E. Autrement, l'abonnement annuel est de 10 \$.

*La Riverogo* estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotkopiita 110<sup>ok</sup>. Senpage por la membroj de E.S.K. Por aliaj, la jara abono kostas 10 CAD. UEA-kodo de la Societo : kebk-d.

Échéance pour le prochain numéro / limdato por la venonta numero : 1998.06.01.

Rédacteur / redaktis : Sylvain Auclair. Ont collaboré à ce numéro / kunlaboris al ĉi tiu numero : Suzanne Bolduc, Normand Fleury kaj Paul Ronald. Administrateurs de la S.Q.E. / estraranoj de E.S.K. : Normand Fleury (président / prezidanto), Sylvain Auclair (vice-président / vicprezidanto), Jessy LaPointe (secrétaire-trésorier / sekretario-kasisto), Zdravka Metz kaj Yvon Roux.

**Esperanto-Societo Kebekia / Société québécoise d'espéranto**

6358-A, rue de Bordeaux

Montréal Québec H2G 2R8

Répondeur et télécopieur / telefonrespondilo kaj telekopiilo: (514) 272-0151

esperanto@sympatico.ca

http://www3.sympatico.ca/esperanto

# Decidu vi, kion UEA faru !

Renato Corsetti

L'article présente comment et pourquoi contribuer à la Campagne 2000 de l'Association mondiale d'espéranto.

**U**EA estas bela asocio. Ĝi estas la perfekta ekzemplo de neorganizita entuziasmo.

Ĉiuj faras tion, kion ili volas fari, ĉar finfine ĉiuj pagas mem per sia tempo kaj per sia mono.

En ĉi tiu senco, mi agnoskas tion, ĝi estas multe pli postmoderna kaj postmodernaĵo ol io strukture kaj hierarĥie organizata kiel la praa roma armeo aŭ kelkaj nunaj multnaciaj kompanioj. Eble pro tio estas multe pli komforte vivi en ĝi. Oni vekigas iun belan printempan matenon kaj decidis ke la fina venko povos nur veni per esperantigo de norvegaj fajrobrigadistoj aŭ de nepalaj skoltoj. Kaj oni tuj ekagas kaj lanĉas senrezultajn alvokojn por ke ĉiuj helpu pri la novaj agadoj.

Tamen, de tempo al tempo, estas ankaŭ bele senti sin parto de pli vasta agado. Tiucele, interalie, estis lanĉata la kampanjo 2000.

Ĝi antaŭvidas esence tri agocelojn :

1-altigi la nivelon de la movado kaj de la komunumo ;

2-altigi la prestiĝon de Esperanto per inform-kampanjoj al neesperantistoj ;

3-altigi nian influon en internaciaj medioj/organizaĵoj, kiuj rekte aŭ nerekte okupiĝas pri lingvoj.

Ĉiu Esperanto-organizaĵo estas stariganta (se ĝi tion deziras) sian konkretan agad-planon. La detalan agad-planon de UEA vi rajtas ricevi per simpla poŝt-karto al la Centra Oficejo (Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando).

Nun, tamen, venis la momento de la vero. Ĉiu agado postulas monon. Oni jam ricevis dekojn da miloj da guldenoj, sed oni entute bezonas eble 300.000 guldenojn.

Se vi, individua membro aŭ eĉ nemembro, deziras kontribui per kiu

ajn malgranda sumo, vi sendu tiun sumon al UEA kun la indiko «konto 2000».

Samtempe vi rajtas decidi por kio oni uzu la sumon, kiun vi sendas. Se vi notos «por celo 1<sup>a</sup>», ĝi estos uzata por produkti materialojn en Esperanto por altigi la lingvan kaj organizan nivelon de la anoj de nia komunumo. Mi volas reemfazi tion, kion nia prezidanto, Lee Chong-Yeong, jam diris : por ni ne ekzistas distingo inter movado kaj komunumo, ambaŭ, kaj la komunumo kaj la movado, ekzistas kaj la movado estas ilo per kiu la komunumo atingas siajn celojn.

Se vi notos «por celo 2<sup>a</sup>», via mono estos uzata nur por propagandi Esperanton al neesperantistoj per produktado kaj disvastigado de nacilingvaj informiloj kaj anoncoj.

## Kvin infanoj el Gorazde en Bretonio

Henri Masson

Kvin infanoj el la bosnia urbo Gorazde, akompanataj de du esperanto-instruistoj, partoprenos de la 11<sup>a</sup> ĝis la 13<sup>a</sup> de aprilo en la kongreso de SAT-Amikaro en Quintin. Alveno de 200 ĝis 300 kongresanoj estas antaŭvidita en tiu urbeto kiu situas proksime de Saint-Brieuc, en Bretonio (la plej okcidenta regiono de Francio).

Jam tri fojojn S<sup>ino</sup> Nicole Rizzoni iris al Bosnio por porti helpon kadre de la asocio Bretagne-Gorazde. La unuan fojon ŝi havis esceptajn kontaktojn kun esperantistoj ankaŭ en Sarajevo. Poste ŝi reiris por instrui esperanton, kaj ŝi sukcesis estigi tiom da entuziasmo ke trafis ŝin la ideo venigi infanojn al Francio. Ŝi klopodas nun trovi monrimedojn por ke ilia restado estu laŭeble plej fruktodona. De ni

Se vi notos «por celo 3<sup>a</sup>», via mono estos uzata esence por subteni la agadon de niaj homoj ĉe UN, Eŭropa Unio, Unesko, ktp.

Krome, vi rajtas ankaŭ noti «por la Ĝenerala kaso de kampanjo 2000». En tiu kazo via mono estos uzata laŭ la bezono en la unuopaj momentoj.

Do, vi, kiuj entuziasme respondis je la alvoko subskribi la Manifeston de Prago, nun same entuziasme respondu per malgranda konkreta helpo al la «konto 2000» kaj krome ĝuu la senton por unu momento esti prezidanto de UEA kaj dikti al ĝi, kion ĝi prefere faru. Cetere, tio ne estas nur tute ŝerca, ĉar el viaj indikoj oni ricevos ideon pri tio, kiun el la tri celoj esperantistoj preferas, kaj sekve oni povos stiri la tutan agadon al la kampo, kiu rikoltas pli da preferoj.

dependas ĉu esperanto estos *gravurita* en la spirito de infanoj, kiuj travivis la inferon de malamo kaj monstra stulteco, kiel sinonimo kaj simbolo de homeco, de frateco. [Interredaktore]

Un groupe d'espérantistes de Hérouville-Saint-Clair (près de Caen, en Normandie) a traduit en espéranto les informations du site web du comité régional du tourisme de Normandie. Ce comité ne conservera les pages en espéranto que s'il y a suffisamment de visiteurs. On peut consulter ce site à l'adresse suivante : <http://www.normandy-tourism.org>.

# Kalendaro de venontaj okazaĵoj

8<sup>a</sup> de majo. **Montreala Esperanto-Kunveno**, ĉe la familio Metz-Fleury. Normando prezentos kiel pretigi florskatolon por ornamo balkonon kaj poste donos informojn pri NAKE. Zdravka gvidos diskutrondon pri aidoso.

27<sup>a</sup> de majo. **Montreala Esperanto-Kunveno**, ĉe la Montreala Esperanto-Domo. Lingva kaj movada diskuto.

29<sup>a</sup> de majo ĝis 1<sup>a</sup> de junio. **Kultura Semajnfino** pri Eldonado, en Antverpeno (Belgio).

Iam en junio (preciza dato per la Papago). **Montreala Esperanto-Kunveno**. Pikniko kaj promenado en la Malnova Haveno, kadre de *Festival Juste pour rire*.

18<sup>a</sup> ĝis 25<sup>a</sup> de julio. 20<sup>a</sup> **Renkontiĝo de Esperanto-Familio**. En Mosonmagyaróvár (Hungario)

24<sup>a</sup> ĝis 27<sup>a</sup> de julio. **Nordamerika Kongreso de Esperanto**, en Montrealo.

1<sup>a</sup> ĝis 8<sup>a</sup> de aŭgusto. **Universala Kongreso**, en Montpeliero (Francio). Temo: *Mediterraneo — ponto inter kulturoj*.

27<sup>a</sup> de decembro ĝis 3<sup>a</sup> de januaro de 1999. 42<sup>a</sup> **Internacia Seminario**, en Kassel (Germanio). Temo: *Dependeco: faktoj, sekvoj, solvoj*.

1<sup>a</sup> ĝis 8<sup>a</sup> de aŭgusto. **Universala Kongreso**, en Berlino (Germanio).

Ni plezure respondos demandojn pri la supraj (kaj aliaj) okazaĵoj: (514) 272-0151.

## Freŝaj ideoj por KEF 98

Sjoerd Bosga

Le festival culturel espérantiste aura lieu cet été à la campagne dans le nouveau centre espérantiste suédois, à 300 km de Stockholm. En guise de nouveauté, et à côté des groupes et artistes connus, on invitera les spectateurs à participer par le biais de cours et d'ateliers.

Ĉi-jare la Kultura Esperanto-Festivalo, konata sed tamen nova, freŝa sed tamen tradicia, revenos al Svedio. Ne nur konsumi sed aktivigi estas la celo! Pro tio okazos pluraj kulturaj kursoj kaj laborgrupoj, en kiuj la partoprenantoj mem aktivigas kaj kulturumas. Por ĉiuj ŝatantoj de teatro, muziko aŭ literaturo, estas jen la ŝanco fari ion mem, kune kun aliaj.

Kiel vi eble scias, la celo de KEF estas kunigi esperantistojn por ĝui kaj sperti plej diversajn aspektojn de la Esperanto-kulturo. Tradicie, dum pluraj tagoj famaj kaj malpli famaj artistoj prezentas siajn kantojn, teatraĵojn, verkaĵojn kaj aliajn artojn al entuziasma internacia publiko. Tiel okazos ankaŭ ĉi-jare, sed... ĉi-jara KEF estos pli ol tio. Nun por la unua fojo, la partoprenantoj povos mem kunagi, sperti kaj lerni en pluraj kursoj kaj laborgrupoj.

Ekzemple, en laborgrupo pri teatra sporto la partoprenantoj improvizos teatraĵojn pri iu donita situacio, konkurse kun alia teamo. Aŭ, oni povas lerni ludi gitaron, aŭ kanti en koruso. Kompreneble estos ankaŭ okazo montri al la aliaj kion oni ĵus lernis. Tiel en KEF la partoprenantoj ne estas nur publiko, sed aktive kontribuas al la Esperanto-kulturo. Eble eĉ malkovriĝos novaj talentuloj!

Jam nun, pluraj famaj artistoj anoncis sian aliĝon al KEF 98. Inter ili estas la fama esperanto-rokgrupo *Persono*, grupo kiu la unuan fojon publike ludis en KEF 86 en Uppsala. Aliaj famaj artistoj kiuj ĉeestis estas Ĵomart kaj Nataŝa, la Kazafina trobadorduopo, konataj pro siaj tuŝantaj kaj melankoliaj kantoj. Pliaj artistoj helpas pere de siaj spertoj en la laborgrupoj.

KEF 98 okazos la unuan fojon en la nova Esperanto-domo de Svedio, en la urbeto Lesjöfors. Ĝi troviĝas agrable for de la bruoj

kaj malpuraĵoj de grandurbo, en la verda koro de Svedio. Pli ol iam antaŭe en la historio de KEF, eblas ĝui kulturon kaj naturon dum sama semajno. En la programo estas ebleco malkovri la ĉirkaŭaĵon laŭlonge de malnova fervojlinio pere de unika veturilo: la drezino. Ĝi estas kvazaŭ biciklo sur reloj, kaj eblas iri per ĝi ekde tuj apud la KEF-ejo. Sed ankaŭ estas aliaj eblecoj malkovri la naturon: perpiede, per ordinara biciklo, aŭ per kanuo sur la abundaj riveroj kaj lagoj.

Vi verŝajne ne trovos Lesjöfors sur via mondmapo, sed sciu ke ĝi troviĝas je proksimume 300 km-oj de ambaŭ Stokholmo kaj Gotenburgo (estas nur 30 mejlojn for, diras la svedoj). Ĝi estas el ambaŭ urboj facile atingebla per buso (eblas preni trajnon ĝis Kristinehamn). Krome okazos komuna vojaĝo el Stokholmo.

Stokholmo, en 1998 la Kultura Ĉefurbo de Eŭropo, en kiu ĝuste dum la tagoj antaŭ KEF okazos la Akvofestivalo. Ĝi estas la plej granda kulturfestivalo en Svedio, en kiu *tuta Stokholmo transformiĝas al scenejo*. Certe indas profiti de vojaĝo al KEF por ankaŭ pasigi kelkajn tagojn en la *Venecio de la Nordo*! Por tiu celo, la organiza teamo de KEF proponas antaŭfestivalon en Stokholmo de la 7<sup>a</sup> ĝis la 10<sup>a</sup> de aŭgusto.

Pliaj informoj pri KEF vi trovos en <http://www.esperanto.se/kef/>, aŭ retpoŝte ĉe Janko Luin, [janko@esperanto.se](mailto:janko@esperanto.se), de kiu vi povas ankaŭ ricevi aliĝilon. Pri la antaŭfestivalo en Stokholmo plie informas Anneli Hovberger, [anneli.hovberger@stockholm.mail.telia.com](mailto:anneli.hovberger@stockholm.mail.telia.com). Pri la akvofestivalo eblas legi en <http://www.waterfestival.se/> aŭ <http://www.stockholm.se/> [Interredaktore]